Tamen Plu

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO MAJO 2009, JARKOLEKTO 27
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019
esperantobob@iprimus.com.au
Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

El medicina ĵurnalo: "Lia pli aĝa frato tre ofte spiras. Lia propra kuracisto opinias, ke tio verŝajne ĉesos kiam li plenkreskiĝos!"

La Jarkunveno de "Esperanto en Sudaŭstralio"

La jarkunvenonon, en Clarence Park, merkredon la 1an de aprilo 2009 partoprenis Margaret, Nancy, Pat, Trevor, Katja, Indrani kaj parton de la tempo Miĥaelo.

1. **Financa raporto de Indrani.**
2. **Programo por 2009 (ekskursoj, informado, enkonduko de Esperanto en lernejojn).**
3. **Detaloj pri la klubaj kunvenoj (loko, kunmanĝado...)**
4. **Konferenco en 2011 – (loko, dato, atingitaj informoj, historiaj faktoj).**
5. **Kiel ni videbligas nian agadon (en radioelsendoj, revuoj).**
6. **Estraro de nia klubo por 2009.**
7. **Pacmarŝo, reklamo sur poŝtkarto.**
8. **Membreco en AEA, legado de ESK**
9. **Lingvofestivalo en Torquay (20a kaj 21a de junio).**

1. **Komence de la jaro estis en nia kaso $ 715, nun enestas $ 865,39. Inter la plej grandaj elspezoj estis la lupago (kompare kun la pasinta jaro ni pagas nur unu fojon ĉiumonate kaj nur pro du horoj, ne 2x3 horojn), Tamen Plu ($ 80), produktado de poŝtkartoj ($ 215), aĉeto de libro por nia biblioteko ($ 85). La ĉefaj enspezoj estis: membrokotizoj ($ 385), interezo ĉe ESANDA ($ 23), vendado de poŝtkartoj ($ 176), vendoj el nia libroservo ($ 131).**

Nia mono ĉe *AU ethical* falis 10%-jn. ESANDA informis, ke de oktobro la nova formo de nia investo estos "term deposit".
Ĉar niaj financoj statas bone, nia membrokotizo ne estos plialtigita, restos $ 25 por pensiulo, $ 35 por laboranto, $ 40 por familio.
Nia financa jaro daŭras de jarkunveno ĝis jarkunveno.
La ĉeestantoj decidis daŭrigi la kolektadon de mono por bonfara celo kaj la kolektadon de uzitaj poŝtmarkoj cele al ilia vendado.

1. **La 18an de aprilo je la 11a horo: Fotekspozicio pri la Naturo (North Tc.) kun Helen.**
   Sabaton la 9an de majo je la 10,30a: Carrick Hills, vizito al la rozĝardeno kaj la ekspozicio de Nora Heysen; gvidos Margaret.
   Sabaton la 13an de junio je la 14a horo: Teatrumado ĉe Pat.
   Julion: mangloarbaro en St. Kilda; respondecos Eileen.
   Septembron: nefindecidite. Katja invitos la virinojn al sia domo por floraranĝado, necesas trovi okupon por la viroj.
   La 24an de novembro: Posttagmezo de Trevor en lia hejmo.
   Dimanĉon la 13an de decembro: Zamenhof-festo ĉe Indrani.

Necesas plibonigi nian informadon de la Neesperanta kaj Esperanta publikoj. Pozitiva okazo: en ESK 1/2009 estas artikolo pri nia lasta Zamenhof-vespero kaj pri la intervjuo en la juda radioelsendo. El la elsendoj de la *Radio 3zzz* aperis rakontoj de Trevor, mencio pri lia artikolo en *La Gazeto* kaj unu artikolo de Katja. Bedaŭrinde, pri nia poŝtkarto ne aperis reklamo en ESK, eĉ se petita.

Sandor kaj Trevor iris al la eduka fako de ministerio en Adelajdo por provi instigi respondeculon enkonduki Esperanton en la lernejojn. Sandor, Trevor kaj Katja vizitis Gordon en ties lernejo, kie Sandor parolis kun la lernejestro

pri eventuala prezento de la lingvo dum iu kunsido de lernejestroj de bazaj lernejoj. Necesas, ke ankaŭ aliaj informiĝu en sia ĉirkaŭaĵo pri la eblo instrui aŭ almenaŭ paroli pri la instruado de Esperanto.

2. **La lupago en nia kunvenejo estas nur $ 7 po hore. La komunuma centro reklamas nin per informo en sia bulteno. Por malmendi la ĉambron necesas 5 labortagoj antaŭ la koncerna dato.**
   Katja: La kunvenejo estas por pluraj el ni tro for. En Gilles Plains estas ebla kunvenejo kostanta $ 12 po hore. La ĉeestantoj konsentis fari tie ”provkunvenon” en julio. Respondos Katja.
   Rilate la manĝadon dum la kunvenoj la decido estis: ĉiu kunportu pladon nur por si mem, sed dolĉaĵon, frukton k.s. por dividi kun la aliaj.
3. **Margaret opinias, ke okazigi konferencon en vintro ne estas bone. La ĉeestantoj komisiis ŝin informiĝi pri loĝ- kaj manĝ-eblecoj por aprilo.**
   Katja havas informfontojn pri la 1-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso. Ŝi pristudis ilin kaj faros en la klubo prelegon pri la gravaj okazintaĵoj.
4. **Bob regule preparas kaj ekspedas Tamen Plu. Meritplena laboro.**
5. **La ĉeestantoj deziras, ke la gvidantaro de la klubo ne estu ŝanĝita. Indrani restos zorgi pri la financoj. La ĉefaj respondeculoj estos Trevor kaj Sandor.**
6. **La 2an de oktobro startos en Novzelando pacmarŝo, kiu trairos la mondon kaj finiĝos en Argentino la 2an de januaro 2010. Ni decidis aliĝi al la loka komitato por subteni la ideon de paco kaj videbligi nin kiel esperantistojn. Respondecos Katja.**
   Indrani donis la ideon meti nian poŝtkarton en retan vendejon. Pri la ebloj pluspuros Margaret.
8. **Novaj membroj de AEA fariĝis Indrani kaj Nancy. Katja atentigis pri la legado de ESK - informoj kaj artikoloj de kaj pri ni.**
9. **En Torquay apud Melburno la esperantistoj okazigos lingvofestivalon (20an kaj 21an de junio). La ideo de**

lingvaj festivaloj montriĝis en multaj lokoj de la mondo ege efektiva informilo kaj varbilo por Esperanto. Katja proponetas vojaĝi al Torquay por helpi al al tieaj organizantoj kaj mem sperti por eventuala festivalo en Adelajdo.

Protokolis Katja Steele

El medicina ĵurnalo: "Al la malsanulo estis amputita piedfingro de la maldekstra piedo antaŭ unu monato. Estis ankaŭ al li amputita la maldekstra kruro super la genuo pasintan jaron."

Peto el Tangshano

Ĉar oni en la kuranta jaro festos la 150an naskiĝtagon de Zamenhof, ni membroj de la Tangshana Esperanto-Asocio aranĝos ekspozicion en la fino de la jaro. Iuj el la ekspoziciaĵoj estos poŝtkartoj kaj uzitaj kovertoj el eksterlando. Tre bedaŭrinde ni ne havas ion tian el Aŭstralio.

Ĉu vi bonvolos sendi al ni kelkajn poŝtkartojn kaj uzitajn kovertojn?

Se vi bezonos ion el nia lando, ni tion povos sendi al vi. Ni petas vin, ĉu vi povas helpi nin? Ni atendas vian respondon. Jen nia adreso:

TEA. P.O. Box 3, Tangshan Hebei, 063000 Ĉinujo,

Sincere via TEA.

El medicina ĵurnalo: "Kiam ŝi svenis, ŝiaj okuloj ruliĝis ĉirkaŭen en la ĉambro."

Gravaj Esperanto-eventoj:

Sabaton la 18an de aprilo je la 11a horo, Helen kondukos nin tra la fotoekspoziciejo en Nordteraso.

Merkredon la 6an de majo je la 18a horo, ni renkontiĝos en Clarence Park.

Sabaton la 9an de majo, je la 10,30a horo, Margaret gvidos nin al Carrick Hills, la rozĝardeno kaj al la ekspoziciejo de Nora Heysen.

Merkredon la 3an de junio, je la 18a horo, ni renkontiĝos en Clarence Park.
Sabaton la 13an de junio je la 14a horo: ni teatrumos ĉe Pat.
Merkredon la 1an de julio je la 18a horo, ni renkontiĝos en Clarence Park.
Poste en julio nin gvidos Eileen tra la mangloarbaro.
La 94a Universala Esperanto-Kongreso okazos de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2009 en la belega urbo Bjalistoko, Polujo.
Merkredon la 5an de aŭgusto je la 18a horo, ni renkontiĝos en Clarence Park.
Merkredon la 2an de septembro je la 18a horo, ni renkontiĝos en Clarence Park.
Iam en septembro Katja invitos la virinojn al sia hejmo por floraranĝado. Necesos trovi okupadon por la viroj.
Merkredon la 7an de oktobro je la 18a horo ni renkontiĝos en Clarence Park.
La jam populara kantofesto ĉe Indrani okazos ĉijare la 24an de oktobro.
Merkredon la 4an de novembro je la 18a horo ni renkontiĝos en Clarence Park.
Sabaton la 7an de novembro ni ”posttagmezumos” ĉe Trevor en lia hejmo”.
La AEA-kongreso okazos de la 27a ĝis la 30a de novembro en Kanbero.
Merkredon la 2an de decembro je la 18a horo ni renkontiĝos en Clarence Park.
Dimanĉon la 13an de decembro. Ni festos la 150-jaran datrevenon de la naskiĝtago de Zamenhof.
La Novzelanda Kongreso okazos verŝajne de la 3a ĝis la 9a de januaro 2010.
La AEA-Somerkursaro okazos en januaro 2010 en Sidnejo.
En 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

El medicina ĵurnalo: ”La malsanulo loĝas kune kun sia patrino, patro kaj testudo, kiu nuntempe estas en flegejo tri fojojn ĉiusemajne.”

El medicina ĵurnalo: ”La pacientino estas 79-jara vidvino, kiu ne plu loĝas kune kun sia edzo.”

Kultura Esperanto-Festivalo

La festivalo KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) okazos refoje en Danujo. Ĉifoje en la ĉarmega urbo de Hamleto, aŭ almenaŭ en lia kastelo en Helsingør/Helsinoro de la 7a ĝis la 12a de julio 2009.

Nun la 9an fojon junuloj en Nordio aranĝas la Kulturan Esperanto-Festivalon, ĝis nun ĝi estis organizita en Svedujo, Finnlando kaj Danujo. Ĝi estas festivalo, kiu prezentas altkvalitan originan Esperanto-kulturon.

KEF estas unika loko por la Esperanto-kulturo. Ĝi estas la loko, kie Esperanto-artistoj povas renkonti unu la aliajn. Ĝi estas ankaŭ la loko, kie oni povos interkonektiĝi kun la plureca vivo de la Esperanto-kulturo kiel aŭskultanto kaj rigardanto de la multaj koncertoj, teatraĵoj kaj literaturaj prezentaĵoj. Sed ankaŭ vi povos mem aktive partopreni en la multaj metiejoj. Interalie vi povos lerni poemi en Esperanto, partopreni dancatelieron, legi kaj fari desegnoseriojn, ludi ludojn en Esperanto ktp. Nur en KEF vi povos ekz. karokeo-kanti en Esperanto, ne per maŝino, sed vivante kun la artistoj mem. Se vi estas infano vi povos partopreni la unuan rokbandon por infanoj kaj fari la unuan cirkon en Esperanto.

Amaso da bone konataj Esperanto-artistoj distros. Jam nun ni scias ke venos: Ĵomart kaj Natasha, Martin Wiese kaj la Talpoj, Hotel Desperado, La Perdita Generacio, Pafklik kaj Inicials D.C., sed multe pli da artistoj estos anoncitaj en la hejmpaĝo. Dum la nokto Flo de Vinilkosmo estros la diskotekon kun dancmuziko nur en Esperanto. Cetere vi povos rigardi filmojn en Esperanto, kaj entute ĝui la plej grandan aranĝon kun Esperanto-kulturo.

La festivalo estos festivaleja en sia formo, tiusence ke oni loĝos primitive kaj tiamaniere oni ne pagos tiom altajn, prezojn kvankam Danujo estas unu el la plej multekostaj landoj en la mondo. Eblos kompreneble ankaŭ loĝi pli lukse

en junulargastejo aŭ en hotelo, sed tio kostos multe pli da mono.

En la semajno tuj antaŭ KEF, en Danujo okazos la plej granda Rokfestivalo en Nordeŭropo – La Roskilde-Festivalo. La dana Esperanto-junularo organizos senpagan Esperanto-renkontiĝon dum la festivalo. Ĉiuj laboros 24 horojn je la DEJO-budo! Ĉiuj en tri okhoraj periodoj. Dum la cetera tempo vi povos festi kun la aliaj kaj aŭskulti koncertojn kaj eĉ gajni monon por partopreni en KEF.

Por pli da detaloj pri KEF kaj la diversaj metiejoj kaj kotizoj rigardu www.kef.saluton.dk.

El medicina ĵurnalo" "Post kiam la malsanulo ĉesis fumadi, lia odoro revenis."

Ŝerco sendita de Brendan

Viro, ne tro granda, fakte malgranda, sidis en drinkejo trinkonte. Venis tre granda, eĉ grandega, kalvokapa, grizbarba ulo kun nigraj sunokulvitroj kaj tatuaĵplena vizaĝaĉo, ledaj jako kaj botoj. Tiu prenis la trinkaĵon de la malgrandulo kaj tuj englutis ĝin. Tiam tiu fimalbonegulegaĉo diris al la alia: "Kion vi intencas fari nun, malfortulo?"

La malgrandulo ekploris.

"Ho, diris la malbonegulegaĉo kun la griza barbaĉo, mi estis malbona al vi, nur ĉar tia estas mia naturo. Mi ne intencis plorigi vin. Ne plaĉas al mi vidi plorantan viron. Mi preferas vidi plorantan virinon!"

"Sed tiu ĉi estas la plej malbona tago en mia ĝisnuna vivo", diris la malgrandulo inter singultoj. "Mi devas tion konfesi, mi estas kompleta malsukcesulo. Nenio, kion mi faras, estas ĝusta! Mi dormis tro longe ĉimatene kaj maltrafis tre gravegan kunvenon. Mia dunginto maldungis min. Kiam mi alvenis al la aŭtomobilrestadigejo, mi eksciis, ke mia aŭtomobilo estas ŝtelita, kaj ĝi tute ne estis asekurita. Mi telefonis por publika luaŭtomobilo, kiu veturigis min hejmen, kaj mi forgesis mian monujon en la luaŭtomobilo. Hejme mi trovis mian edzinon en la lito kune kun nia ĝardenisto. Mia amata hundo mordis min. Mi do iris al tiu ĉi drinkejo por

kuraĝigi kaj mortigi min. Mi aĉetis trinkaĵon, enmetis pilolon da veneno en ĝin kaj rigardis dum la veneno solviĝas en la biero, kaj jen venis vi kaj trinkis ĝin!"

El medicina ĵurnalo: "La malsanulo estis, kiel ĉiam, eĉ tre bonhumora, ĝis la benzinujo de lia flugmaŝino sekiĝis, kaj li teren falis."

En sia hejmo vekiĝas viro kun postfestaj kapdoloroj. Kun peno, eĉ penego, li finfine sukcesas malfermi siajn okulojn. La unua, kion li vidas, estas paro da kapdolorpiloloj apud glaso da akvo sur la litotableto, kaj apud ili, ruĝan rozon. Li sin sidigas, kaj vidas, ke puraj vestoj atendas lin.

Li ronden rigardas en la ĉambron kaj vidas, ke ĉio estas en perfekta ordo. Pure, eĉ purege ĉie.

Li manĝas la pilolojn kaj ŝokiĝas vidante, ke granda nigra okulo rigardas al li el la spegulo. Li ekvidas slipon kun la surskribo: "Karulo, la matenmanĝo estas en la forno, mi eliris frue por butikumi.... Mi amas vin !"

Li enfalas en la kuirejon kaj je sia surprizo vidas, ke freŝa matengazeto lin atendas. Lia filo sidas ĉe la tablo manĝante. Li demandas sian filon: "Filo, kio en la mondo okazis pasintan nokton??"

"Hmm... vi hejmen venis je la 3a horo, kun cerbo ne plu funkcianta kaj ege ebriega. Vi rompis kelkajn meblojn, vomis en la koridoro kaj ekhavis nigran okulon kiam vi batis vian kapon kontraŭ la pordokadron."

"Sed kial ĉio estas en tiom perfekta ordo kaj tiom purega? Mi ricevis rozon, kaj matenmanĝo en la forno **atendas min!"**

Respondis lia filo: "Ho tio!! Panjo puŝis vin en la dormoĉambron kaj kiam ŝi provis malsupren tiri vian pantalonon, vi kriegis: "NE FARU TION, VI MALJUNA SAKO!! MI ESTAS EDZIĜINTA!!"

El medicina ĵurnalo: "Ni certigis ŝin, ke ŝia koro estas en bona ordo, kaj ke ĝi daŭros la reston de ŝia vivo. Sed ni rekomendis al ŝi, ke ŝi tuj revenu al la malsanulejo, se ŝi subite kaj neatendite perdos la konscion!"